

## El la enhavo:

88-a UK en Gotenburgo  
Lingvaj rajtoj kaj respondecoj  
Kongresa Rezolucio  
Novaj Honoraj Membroj de UEA  
Kongresa universitato  
OSIEK-konferenco  
70-jaroj en Svitavy  
Renkontiĝo en Lančov



## ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

**Esperantistoj en Svitavy plantas  
Esperanto-arbon okaze  
de la 70-jariĝo de sia klubo**



## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 4-foje jare. Abono 9 eŭroj (+ 2 eŭroj aerpoŝte),

### rete Starto:

malovec.starto@clavis.cz,

www.clavis.cz/starto, rete ĈEA:

cea.polnicky@quick.cz (sekretario)

podhradska@volny.cz (prezidanto)

www.kuk.cz/cea/

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 250 Kč, B 150 Kč, D 70 Kč, E 70 Kč, F 5000 Kč, G 130 Kč (Starto), N 25 Kč, eksterlandanoj 12 eŭroj, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 600 Kč komentantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova@quick.cz

**Libroservo:** Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6, 15200 Praha, tel. 251 817 732, m.pluharova@worldonline.cz

**Sekcioj de ĈEA:** junulara, katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, ŝakista, SAT-amikara, pri informadiko

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia, gazetara-informa

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, c/o Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz

**ICO de ĈEA:** 00 44 30 34

**Banko-konto de ĈEA:**

3330-021/0100, Komerční banka Poděbrady

ISSN 1212-009X

## Komitato de ĈEA:

**Prezidanto:** Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 543 233 047, podhradska@volny.cz (vnější a vnitřní vztahy, čestní členové)

**Vicprezidanto (ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio):** Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. 1, 130 00 Praha 3, tel. 222 780 677 (zápisy, koncepce, metodika)

**Vicprezidanto (komitatano A de UEA):** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, fakso 257 712 126 chrdle@kava-pech.cz (mezinár. vztahy, UEA, vydavatelská činnost)

**Sekretario:** Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel./fax. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz (sekretariát, členská základna, účetnictví)

**Kasisto:** Jindřich Ondráček, Bubenská 17, 170 00 Praha, tel. 220 879 386 (konference, sjezd)

**Komitatano:** Líbuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, 461 532 257, dvorakova.libuse@khspce.cz (kluby a kroužky)

**Komitatano:** Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, 602 611 584, jirka.tomecek@post.cz (sekce, komise)

**Kontrolgrupo de ĈEA:** Prezidanto: Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, josef.hron@vakpce.cz, tel. 466 401 942;

Věra Šlaharová, Jana Zajíce 2873/22, 400 11 Ústí n. L., slaharova.v@kr-ustecky.cz; Jiří Souček, Mečislavova 223/8, 140 00 Praha 4, soucek@komercpoj.cz

**Redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 547 240 690, starto@clavis.cz

**Kontrollegis:** L. Dvořáková, M. Pastrňák, V. Podhradská, P. Polnický

**Esperanto-muzeo:** Jiří Pištora, Městské muzeum, Staré nám. 78, 560 02 Česká Třebová, muzeum.ct@worldonline.cz

## Lingvaj rajtoj kaj respondecoj

Tia estis temo de la ĉijara UK en la sveda Gotenburgo en la tagoj 26.7.-2.8.2003. La kongreson partoprenis 1791 personoj el 62 landoj de la mondo. Kiel kutime, la ĉambroj de la kongresejo ricevis la nomojn laŭ famaj, jam forpasintaj esperantistoj (Adamson, Engholm, Harry, Hodler, Kalocsay, Langlet, Lapenna, Lundgren, Nylén, Zamenhof). Inter novaj Honoraj Membroj de UEA aperis ankaŭ nia Josef Kavka, al kiu ni gratulas.

Kvankam la solena inaŭguro okazis nur lunde, jam dimanĉe realiĝis multaj programeroj. Merkredo estis jam tradicie dediĉita al ekskursoj, la solena fermo estis sabate. La kvintaga programo proponis ĉ.170 programe-rojn. La aŭspicion pri la kongreso akceptis la sveda ĉefministro Göran Persson.

### Saluto de la ĉefministro

Mi salutas la partoprenantojn de la internacia kongreso de Universala Esperanto-Asocio varme bonvenaj al Svedio kaj Gotenburgo.

Vi venas al Svedio en sezono, kiam

nia lando estas plej bela. Multaj verkistoj, poetoj kaj muzikistoj dum jarcentoj priskribis kaj prikantis la mirindan verdon kaj varmon de la sveda plensomero. Dank' al la eksterordinaraj kapabloj de la lingvo la homoj povis rakonti al aliaj pri la tute speciala freŝeco kaj lumo de la sveda somero.

Ĉar lingvo estas kaj restas kondiĉo por transdono de spertoj kaj scioj. Per literoj, vortoj kaj frazoj okazoj kaj eventoj povas esti priskribataj - de homo al homo, de generacio al generacio. Per la unika homa kapablo interparoli ni havigas al ni sciojn pri niaj reciprokaj kondiĉoj kaj realaĵoj. Lingvo estas kaj restas la premiso de civilizo kaj de paca kunekzistado.

Mi sincere esperas, ke la laboro antaŭ vi estas multflanke grava. Mi esperas, ke la laboro de la kongreso disvolvi kaj disvastigi la internacian lingvon esperanto povas kontribui al pli bona interkompreniĝo inter homoj - kaj per tio utili al paco, libereco kaj komuneco ene de kaj ekster la nacilimoj.

*Göran Persson*



### El mesaĝo de la Asista Ĝenerala Direktoro de UNESKO

Kiel vi scias, UNESKO aljuĝas grandan gravecon al kunlaboro kun ne-registaraj organizoj, ĉu internaciaj, ĉu naciaj, ĉar ni same celas krei solidarecon kaj interkompreniĝon. Pro tio ni alte taksas niajn multjarajn rilatojn kun Universala Esperanto-Asocio, kiu ĉiam aktivis por establi ligojn inter diversaj popoloj, tiel kontribuante al internaciaj interkompreniĝo kaj paco. UNESKO rigardas lingvojn kiel kanalojn de dialogo kaj do de interkompreniĝo. Pacaj interrilatoj inter la nacioj de la mondo nepras en la nuntempo, kaj lingvo kaj kulturo estas la ŝlosilaj elementoj de internacia dialogo.

Ĉiu lingvo estas kaj esprimo de la kulturo de komunumo kaj ilo por konservi tiun kulturon por postaj generacioj. Ĉiu lingvo en la mondo prezentas unikan manieron percepti la realon. Estas danĝero, ke multaj el tiuj lingvoj, protektantoj de diverseco, malaperos dum la venontaj jaroj, se ni ne multe penos por ilin konservi.

Per tio, ke ĝi stimulas komunik-metodon, la Esperanto-movado helpas konstrui pontojn de interkompreniĝo inter diversaj popoloj kaj kulturoj. Tiunmaniere Esperanto helpas montri, ke unueco kaj diverseco eblas kaj fakte necesas.

*komisiite de la Ĝenerala Direktoro  
John Daniel, Parizo, 2003-07-23*

### El parolado de nepo de L. L. Zamenhof

Okazis, ke antaŭ sesdeko da jaroj la nomo de, tiam de ni ne konata, urbo Gotenburgo aperis al mi, al mia familio, ĝuste kiel sinonimo de tiuj homaj rajtoj, kiel sinonimo de libereco. Al ni, en Varsovio tiam sub okupacio, al ni enkarcerigitaj antaŭ la fi-famaj muroj, Gotenburgo egalas mondon fabelan, mondon el kiu, same kiel manao de ĉielo en tempoj bibliaj, alvenadis diversaj bongustaj manĝaĵoj kies ekzisto estis ĉe ni, tiutempe, jam de longe forgesita. Mi ĉiam memoros la nomon de la sendinto aperinta sur la pakajoj: la nomon de Einar ADAMSON, gotenburgano kaj esperantisto. Mi havis la ŝancon, kelkajn jarojn pli malfrue, konatiĝi persone kun la karmemora Homo, okaze de la kongreso en Malmö, la sola kiun mi sukcesis partopreni dum postmilita jardeko. Tiam mi konatiĝis ankaŭ kun la urbo Gotenburgo, kaj amikiĝis kun la tuta familio ADAMSON; cetere la filino de Einar daŭre estas amikino tre kara.

Enkadre de nia UEA ni daŭre laboru kaj batalu por la lingvaj rajtoj, sed ankaŭ, same kiel antaŭ sesdek jaroj, por la homaj rajtoj ĝenerale kaj tute specife por la rajto nenie malsati sur nia terglobo.

*Louis C. ZALESKI-ZAMENHOF*

## Pri la kongresa temo:

Sub kiuj cirkonstancoj oni povas aserti, ke difinita homo havas “rajton” utiligi difinitan lingvon en difinitaj situacioj? Ĉu, ekzemple, ni havas “rajton” postuli, ke la ŝtato eduku niajn infanojn en nia denaska lingvo? Kaj ĉu samas la situacio se temas, unuflanke, pri forta lingva komunumo en difinita ŝtato (ni diru, la kataluna) aŭ, aliflanke, se temas pri familio de enmigrintoj, kiuj estas solaj en la regiono, kiuj parolas iun lingvon de la propra patrolando? Ĝis kiu grado ano de lingva minoritato, ekzemple, havas etikan “devon” aŭ “respondecon” konservi kaj utiligi sian lingvon? Ĉu tia respondeco etendiĝas al uzantoj de Esperanto?

Kunlige kun la temoj de niaj kongresoj, ni ofte invitas eksteran fakulon veni al la kongreso por transdoni al ni siajn spertojn. Ĉi-jare ni invitis la profesoron Charles Durand, kiu estas konata en la franclingva mondo pro du libroj, *La mise en place des monopoles du savoir* (La starigo de monopoloj de scio), kaj *La nouvelle guerre contre l'intelligence* (La nova milito kontraŭ la inteligento). En siaj libroj profesoro Durand, kiu estas profesoro en la Teknologia Universitato de Belfort-Montbeliard en Francio, aparte emfazas la efikon de la unulingveco de la internacia mondo, en kiu la angla lingvo forpuŝas ĉiujn aliajn lingvojn. Li bone konas la

terenon: li estas specialisto pri informadiko, kaj li instruis dum multaj jaroj ne nur en Francio sed ankaŭ en Usono.

Ni petis profesoron Durand klarigi siajn ideojn. Ĉar li ankoraŭ ne estas parolanto de Esperanto, li parolos al ni hodiaŭ en la franca lingvo.

La temon ni traktos ĉefe en diskutgrupoj, esence pere de serio da demandoj. Kio (ekzemple) estas rajto, kaj, inter la diversaj homaj rajtoj, kio estas lingva rajto? Ĉu estas diferenco inter individua lingva rajto kaj kolektiva lingva rajto? Ĉu ekzistas ankaŭ lingvaj respondecoj - ne nur juraj, sed ankaŭ moralaj? Kiujn reciprokajn respondecojn havas lingva malplimulto kaj la ĉirkaŭanta lingva plimulto flegi kulturen interkompreniĝon per tradukado, lingvoinstruado kaj alimaniere?

Ĉu ni povas ekspluati difinitajn nuntempajn politikajn evoluojn favore al Esperanto, ekzemple reziston al la influo de la angla lingvo en Eŭropo? Ĉu ni povas vekti apogon por Esperanto en sciencaj kaj teknikaj medioj?

Kiun ekvilibron ni trovu inter unuflanke la pledado por Esperanto kaj aliflanke la atentigo pri maljustaj solvoj de la internacia komunikado per etnaj lingvoj? La Esperanto-movado estas parte protesta movado: kontraŭ lingva malegaleco, lingva maljusto, lingva diskriminacio.

*Humphrey Tonkin*

**NATURA SIMBIOZO**

*Parolado de Charles Durand pri la kongresa temo. Esperanta traduko.*

Antaŭ ĉio mi volas danki al Sinjoro Renato Corsetti, Prezidanto de UEA, pro tio ke li invitis min partopreni tiun ĉi kongreson kaj tiel havi la eblecon alporti mian modestan kontribuon al la faritaĵoj kaj al la laboroj de la esperantistoj.

Hodiaŭ nepras, ke ni disrompu la cirklobarilon de silento trude starigitan de la amaskomunikiloj kaj de la oligarkio, de kiu ili estas komisiitaj. La esperantistoj ne nur promocias Esperanton. Ili ankaŭ postulas la rajton, kiun havas la popoloj por sia digno, pensi, labori per siaj lingvoj, vivi laŭ siaj propraj kulturoj, esti si mem plene kaj sentrude. La esperantistaj asocioj havas multajn komunajn ecojn kun aliaj grupoj, kiuj kreiĝis dum la dekvin pasintaj jaroj dise tra la mondo kaj aparte en Eŭropo. Tiuj grupoj prizorgas la defendon de multaj naciaj lingvoj, kiujn la tutmonda plutokrataro ŝatus nuraj dialektoj, kaj kies rolo tiel iĝus esence folkloraj. Jen kial alianco inter esperantistoj kaj la ĵus cititaj asocioj estas alte dezirinda. Dume, miaopinie ekzistas ĉiuj necesaj faktoroj por estiĝi el tiu alianco ververan simbiozon, kio helpas nin multe pli efike dissciigi niajn mesaĝojn. Hodiaŭ la esperantistoj estas la solaj, por proponi al ni lingvon vere internacian kaj de ĉiuj akireblan. Mi ne ĉi

tie priskribu la avantaĝojn de Esperanto, ĉar vi ĉiuj ilin scias pli bone ol mi, kiu ankoraŭ ne parolas vian lingvon. Tamen aliaj asertas al ni, ke la gepatra lingvo de iu grupo, reprezentanta ne pli ol 6 ĝis 7% de la tutmonda loĝantaro, estas universala lingvo, kaj tio starigas al ni seriozan problemon. Fakte, se unu natura lingvo estas proklamita universala, tio samtempe subaŭdigas, ke la aliaj ne estas tiaj. Se unu lingvo posedas superecojn super la aliaj, tio memkompreneble substrekas alies malsuperecon. Tion oni nomas duopecon de la kvalifikiloj, kaj tio estas ege ĝena, ĉar, se unu lingvo superas la aliajn, ĝiaj parolantoj same konsideratos superantaj la alilingvanojn, vole nevole.

Mi ŝatus ĉi tie parentezumi. Ni ĉiuj scias, ke antaŭ 1960 ekzistis en Usono strikta rasa apartigo bazita sur la laŭdira malsupereco de la nigruloj. Dume ĝisfundaj enketoj montris, ke la nigruloj mem plejmulte samopiniis ĉi tiel. Tiu interkompletiĝo de la opinioj iam ekzistas en la rilatoj inter koloniantoj kaj koloniatoj, inter regantoj kaj regatoj. Nu, ni konstatas similan situacion inter la denaskaj parolantoj de la laŭdire universala lingvo kaj la ceteruloj. La preskaŭ sistema diskriminacio favoranta la denaskajn angloparolantojn estas natura sekvo de la supereco prikonsentita al la angla lingvo, tial ke en multaj landoj la angla



lingvo estas formale agnoskata kiel la nura lingvo uzota en ekzemple la internaciaj teknikaj-sciencaj interŝanĝoj. Ankaŭ la diskriminaciaj dungprocedoj povas ekzisti nur pro la kredo - komuna de la denaskaj angloparolantoj kaj de tiuj kiuj ne tiaj estas - pri tiu laŭdira supereco de la angla lingvo. Tiu kulpa interkonsento, inter tio kio estas nenio alia ol unu reganta grupo kaj alia regata grupo, estas nas-kanta ene de ĉiuj internaciaj organizaĵoj - ja ne devigataj je dungaj kvotoj - evidentajn malegalecojn, kiujn la aktualaj tendencoj povas nur plifortigi. En Eŭropo iuj provas kredigi al ni, ke la scipovo de la angla estiĝis nemalhavebla pro komercaj reguloj kaj planedskalaj komunikbezonoj. Dume kiel ni scias, se la celoj de tia lernado estus nur pragmataj, al Esperanto kaj ne al la angla la apostoloj de la universala interkompreniĝo devus sin turni! Devige ni konstata, ke la angla rolas hodiaŭ en kontinenta Eŭropo same kiel antaŭ 1990 la rusa en la satelitoj de Soveta Unio kaj en ties aneksitaj respublikoj. La socilingvisto Louis-Jean Calvet evidentigis en tiu procezo eĉapojn tute similaj al tio, kio videblas nun en okcidenta Eŭropo pro la angla. Malesto de lingva politiko en la neruslingvaj respublikoj sekvigis ampleksajn vortajn prunteprenojn el la rusa lingvo, aparte en la sciencaj kaj teknikaj sferoj. Tiel tre rapide, la lokaj lingvoj izoliĝis en poramasaj funkcioj, dum la rusa specifigis por la

informadaj, oficialaj, sciencaj funkcioj. En 1975 dum konferenco okazinta en Taŝkento estis proponata la instruado de la rusa ĉie ekde la infanvartejo, kaj poste en 1979, dum alia konferenco en Taŝkento titolita *La rusa lingvo, lingvo de amikeco kaj de kunlaborado de la sovetaj popoloj*, estis sugestite devigi la studentojn redakti siajn memuarojn en la rusa. Sekvis manifestacioj en Tbiliso (Kartvelujo), Talino (Estonujo), ribeletoj en la aliaj baltaj landoj, peticioj de la kartvelaj intelektuloj, ktp... Iuj lingvanoj ekkonsciis, ke ilia lingvo malrapide solviĝas en la rusa. Okazis do fenomeno de akcelata sorbado de la sovetaj lingvoj far la rusa, neniel volita de la popoloj, sed male ĉiel dependanta de la potenco kaj de la lingva politiko de Rusujo fronte al ties satelitoj. Estas evidente, ke simila procezo estas disvolviĝanta en la eŭropaj landoj, kaj tio igas opinii, ke la eŭropunia konstruiĝo faciligas la rapidan satelitiĝon de la malnova kontinento sub la usona Ameriko. En Soveta Unio la prunteprenoj el la rusa estis malpliigontaj la diferencojn inter la lingvoj profite al la rusa. Aplikite tiam en Soveta Unio kaj hodiaŭ en kontinenta Eŭropo, tiu speco de lingva imperiismo nature laŭiras diversajn vojojn, samtempe influante la lernejan kaj universitatan politikon, la lingvoplanadon kaj la amaskomunikilojn. La lingva imperiismo ne estus

tre danĝera, se ĝi ne estus la elmonro de kruda simpla imperiismo, kaj sufiĉas observi por taksu ties entenaĵojn.

En multaj landoj ĉi tie reprezentataj la amaskomunikiloj injektas en la naciajn lingvojn, tute artifike, centojn da novaj anglo-usonaj vortoj, kiuj tiel anstataŭas la lokan vortprovizon. Tiel estas ekzemple en la itala, en la germana, en la franca, en la hispana, en la sveda. En la reklamiloj la bildoj pri moderneco, pri teknologio tiel nomata "alta", pri movebleco, pri scienco, pri liberaleco, pri efikeco, pri profesia sukceso, pri riĉeco, kaj eĉ pri sporto, estas ekde nun preskaŭ ĉiam kunligitaj kun anglo-usonaj terminoj, kiuj tiel tute artifike anstataŭas la terminojn de la gepatraj lingvoj, tiamaniere vunditaj. Tiu seninterrompa entrudiĝo kreas en la loĝantaro Pavlovan reflekson, kiu favoras ne nur la trejnadon al la angla lingvo sed ankaŭ la konsenton por la ega anglo-saksa superrego kultura, ekonomia kaj politika fare de la socioj, kiuj pro ĝi suferas.

Rémi Kauffer, profesoro en la prestiĝa lernejo pri politikologio ("Sciences-Po") de Parizo, skribas en sia libro titolita "La armilo de la misinformado. Milito de la multnaciaj firmaoj kontraŭ Eŭropo":

"Trudante siajn konceptojn, siajn terminarojn, siajn mondprojektojn, Usono provas enkatenigi siajn rivalojn en pensadocirklojn por ili desegnitan, tiamaniere ke tiel malliberigite ili ne

plu povos eligi sin el ĝi. Trudi sian vortprovizon estas privenki la unuan batalon. De "brainstorming" al "wargame", de "teenagers" al "fast-food", de "management" al "benchmarking" la usonanoj estas plifruigintaj antaŭ iuj aliaj. Dank' al tiu kreskanta entrudiĝo la uson-brita influo povis disvastiĝi. De la reganta elitaro, de la ekonomiaj medioj, ĝis la "antaŭeniĝantaj" rotoj el la mezaj socitavoloj, ĝi enpenetris la popolajn klasojn. Pervorta batalo, perbilda batalo. Laŭ tio ke la usonecigo de la terminoj kaj de la imagitaĵoj kunestas kun la usonecigo de la konsummodo, tiu fenomeno donas unu el la plej efikaj subteniloj por la entrudiĝo de la usonaj firmaoj en la progresantaj merkatojn. Nu, eĉ se komerca, iu ajn milito estas unue milito de la spiritoj. Ankaŭ ĝi tute ne kompareblas kun psika "blitzkrieg" (fulm-milito) elpensita kaj gvidata al proksima celo. La misinformado male entenas daŭran agadon zorge estritan kaj gravajn rimedojn teknikajn, financajn, homajn". Tiu ĉi klarigo estas do geografipolitika kaj ĝi plene konfirmas la diraĵojn de Zbigniew Brzezinski, kiam li asertas, ke "Eŭropo estas de nun usona protektorato".

Niaj tiel nomataj elitoj absolute ne prikonscias, ke la posedantoj de la vortoj kaj de la lingvo posedas ankaŭ la penson, kaj ke posedante alies





## Rezolucio de la 88-a Universala Kongreso de Esperanto

La 88-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Gotenburgo, Svedujo, de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 2003, en ĉeesto de 1800 personoj el 62 landoj, kaj traktinte la temon "Lingvaj rajtoj kaj respondecoj"

**atentigas** pri la pluraj iniciatoj kaj deklaroj de Universala Esperanto-Asocio en lastaj jaroj pri la konservado de lingva pluralismo ene de ŝtatoj kaj en la rilatoj inter ŝtatoj, kaj pri la rolo, kiun la Internacia Lingvo Esperanto povas ludi kiel efika kaj neŭtrala ponto inter la diversaj lingvoj;

**notas** en tiu rilato ekzemple la Manifeston de Prago (1996) pri lingva demokratio, kaj rezoluciojn de Universalaj Kongresoj de Esperanto en Zagreb, Kroatio (2001), kaj Fortaleza, Brazilo (2002);

### **konstatas,**

- ke lingvoj plenumas fundamentan rolon en homaj socioj ne nur kiel iloj de komunikado sed ankaŭ kiel manieroj por esprimi sian identecon;
- ke lingva diverseco reprezentas unu el la grandaj riĉaĵoj de la homa kulturo kaj estas konservenda en la kunteksto de demokratia lingvopolitiko, kaj ke tia politiko ankaŭ liveras la lingvajn rimedojn ne nur por komunikado ene de socioj, sed ankaŭ inter la socioj;

- ke lingvaj rajtoj-nome tiuj rajtoj, kiuj rilatas al la kontentigo de

komunikbezonoj kaj la esprimado de identeco en plurlingvaj situacioj-estas esenca sed tro ofte neglektata elemento en la fundamentaj homaj rajtoj;

- ke la realigo de lingvaj rajtoj estas afero ne nur jura sed ankaŭ morala, en kiu ĉiu havas respondecon partopreni;
- ke tiuj rajtoj aplikiĝas, aŭ devus aplikiĝi, je ĉiuj niveloj de la homa socio, ekde la rajtoj de individuoj tra la protektado de lingvaj malplimultoj ĝis lingva egaleco en la rilatoj inter ŝtatoj;
- ke la principoj de egalrajteco kaj de demokratia komunikado postulas konservadon de la lingva diverseco en multlingvaj komunumoj, en la kadro de egaleca kaj klara lingvopolitiko, ĉar tio ebligas maksimuman socian partoprenon de ĉiuj civitanoj;

- ke manko de klara kaj aktiva lingvopolitiko malfermas la vojon al lingva dominado kaj hegemonio;

- ke eblas konservi lingvan diversecon, precipe en interŝtataj rilatoj, nur per aktiva lingvopolitiko cele al realigo de neŭtrala multlingvismo, en kiu neniu lingvo havas dominan rolon;

**atentigas** pri la multjaraj spertoj de la Esperantlingva komunumo kiel modelo de egalrajta komunikado en multlingva socio kaj pri la preteco de tiu lingvo por ludi multe pli aktivan rolon kiel pontolingvo en la rilatoj inter ŝtatoj kaj en multlingvaj sistemoj de komunikado,

**petas** la diversajn Esperanto-organizaĵojn, je internacia, nacia kaj loka niveloj, kunlabori en sistema klopodo atentigi pri la kvalitoj de la Internacia Lingvo Esperanto, kaj konservi kaj evoluigi la lingvon tiel ke ĝi plej bone ludu sian rolon kiel transponta lingvo en multlingvaj situacioj,

kaj **alvokas** al ĉiuj internaciaj organizaĵoj registaraj kaj neregistaraj, al registaroj kaj aliaj instancoj, al fakuloj kaj sciencaj organizaĵoj, kaj al ĉiuj civitanoj, kiuj deziras konservi kaj fortigi lingvan egalecon je ĉiuj niveloj, pli profunde esplori la kapablojn kaj atingojn de la Internacia Lingvo Esperanto en la rilatoj inter lingvoj kaj popoloj ĉie en la mondo kaj apliki ties lingvajn rimedojn.

## UK integriĝu blindulojn

La kunsido "*Esperanto, ĉu inkluziva movado?*" estis aragita pro dubo aparte pri blinduloj, kvankam Esperanto nomas sin "ĉies lingvo".

Blinda s-ro Aldo GRASSINI el Italio, la ĉefparolanto, prezentis la longedaŭrecon de blindula Esperanto-movado, ekz. brajla organo "Esperanta Ligilo" de LIBE (=Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj) 100-jariĝos en 2004, kaj gvidantecon de-blinduloj en la ĝenerala Esperantomovado en diversaj landoj. Li klarigis ankaŭ pri malfacilaĵoj por blinduloj en la socio kaj en la Esperanto-movado, i.a. tamen

nuntempe komputilo helpas multe kaj en reta komunikado blinduloj estas bone integritaj, kvankam tio validas ne por ĉiuj blinduloj.

Sekve s-ino KIKUSIMA Kazuko el Japanio prezentis klopodojn en diversaj Esperanto-eventoj en Japanio: aranĝi kotizkategorion "handikapitoj" por prezenti la akceptemon; en malfermo kelksekunde informi pri ĉeesto de blinduloj; meti en dokumentujon informilon pri kontakt-maniero kun blinduloj (ĉi UK faris!); organizi fakkunsidon por konigi diversajojn pri blinduloj.

Poste parolis Povilas Jegorovas pri la perspektivoj de IKBE (Int. Kongreso de Blindaj E-istoj) en Litovio en 2005. Blindaj esperantistoj en Litovio estas ja malmultaj, sed helpas Litova E-Asocio kaj la brajla biblioteko, kiu de longe produktas altkvalitajn materialojn. "Eblas lerni la lingvon en du jaroj."

La ĉefa espero estas tamen UK plus IKBE en Japanio 2007. Laŭdon la japana JABE, i.a. Krizantemo, ricevis pro la informilo ĉe la kongrespaperoj "*Kiel vivi kun vidhandikapitoj*".

Japania e-isto japane publikigis en gazeto la libreton "*Ne tiel sed ĉi tiel. Por agrablaj kontaktoj kun vidhandikapitoj*" kaj JABE publikigis la prelegon de Olena Pošivana "*La sesa senso*" el 1998.

KIKUSIMA Kazuko, Rob Moerbeek



## Biografioj de novaj honoraj membroj

**Edwin Burg** (Nederlando) naskiĝis en 1925 en Indonezio. Malliberigita en koncentrejo en 1942-1945, li ekloĝis en Nederlando (1946), studis ekonomikon kaj laboris en banko en Hago.

Esperanton li eklernis en 1965 kaj ekde tiam dediĉis sin al disvastigo de la lingvo. Varbis centojn da novaj esperantistoj per privataj rilatoj, skribis leterojn pri la lingvo al aŭtoritatuloj kaj ĵurnaloj, mecenatis plurajn E-organizojn.

En 1979, post emeritiĝo, iĝis gvidanto de la oficejo de la Internacia Esperanto-Instituto (IEL) en Hago. Ekde 1995 estrarano de IEI. Lia agado estas altnivela kaj profesia, li multloke kreis grandan respekton por la lingvo.

**Adolf Burkhardt** (Germanio), protestanta pastro, naskiĝis en 1929 en Germanio. Esperanton li eklernis en 1947 per koresponda kurso; partopreninte en UK en Haarlem en 1954, definitive esperantistiĝis. Tre aktiva en GEA, precipe pri la biblioteko: la nuna Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen estas sub lia direktorado. Ekde 1961 prezidanto de KELI kaj ĝia motoro. En 1992 ricevis Bundesverdienstkreuz (Kruco por Meritoj al la Federaĵo de

Gernamio pro sia ekumena laboro per kaj por Esperanto).

Multe tradukis. La krono de tiu laboro estas *Adoru*, granda kristana kantlibro eldonita en 2001. Pro tiu verko kaj lia verkaro ĝenerale li ricevis, kune kun pastroj Eichhom kaj Kronenberger, la Esperanto-kulturpremion de la FAME-fondaĵo.

**Imre Ferenczy** (Hungario), naskiĝis en 1932 en Hungario. Lernis Esperanton en 1950, diplomiĝis kiel kuracisto en 1957.

Kunfondinto de la Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro en 1955; prezidanto de junulara fako de HEA ĝis 1960; gvidanto de medicina fakkomisiono de HEA en 1970-2000; junulara gvidanto de IFEF ĝis 1970; realiganto de laborkontrakto inter TEJO kaj IFEF en 1968 (UK Tarragona). Pro lia instigo ekde 1982 dum IFEF-kongresoj funkcias radioamatora stacio kun speciala voksignalo.

En 1970 iĝis privata sekretario de d-ro Hideo Ŝinoda; ekde 1985 daŭre prezidanto de IMEK, internacia kongreso por E-medicinistoj. Membro de redaktantaro de MIR. Organo de UMEA. Prezidanto de la Monda Yumeiho-Societo, fondita en 2001 en Budapeŝto.

Fondinto kaj prezidanto de hungara sekcio de ILERA kaj hungara sekcio de la Internacia Fervoĵista Radioamatora Asocio.

**Salah Ĝanem** (Libano)

Profesoro Salah Ĝanem naskiĝis en 1933 en Libano. Li estas psikologo kaj grafologia jurspertulo ĉe tribunaloj.

Lernis Esperanton en 1960; estas pioniro de la movado en Libano, kies LA li prezidis dum pluraj jaroj. Eldonis la unuan E-araban lernolibron en 1965 kaj prizorgis E-elsendojn de radio en Libano. Honora membro de la Internacia Societo de Amikeco kaj Bonvolo (1984); prezidanto de alta komitato por festi centjariĝon de Esperanto (1987). Membro de la Brazila Akademio de Belarto (1965).

**Josef Kavka** (Ĉeĥio) naskiĝis en



1922, doktoro pri natursciencoj, kandidato de teknikaj sciencoj, petrologo.

Laboris multajn jarojn sur Esperanta scienca kampo, verkis plurfakaj informajn artikolojn kaj eseojn. Ĉefredaktis Sciencan Revuon (1978-1987) kaj Geologion Internacian (1968-1990), kunredaktis Sciencan Revuon ekde 2000. Kunlaboris pri Poŝtatlaso de la mondo (1971), multjara funkciulo de ISAE, ĝia ĝenerala sekretario de 1971 ĝis 1980. ISAE kaj ĈEA atribuis al li honoran

membrecon pro liaj meritoj.

**Antanas Mekys** (Litovio) naskiĝis en Litovio en 1917, studis ekonomikon, unue lektoris en la Vilnusa Universitato, poste laboris en Ŝtata Komisiono pri Planado ĝis emeritiĝo. Ekinteresiĝis pri Esperanto en 1933, serioze lernis en 1955. Ekde 1959 agis en LA kiel instruisto, instruis al miloj da homoj per tradiciaj kaj korespondaj metodoj.

Verkis diversspecajn lernolibrojn por lernantoj, klubkursanoj kaj junuloj, publikigis ilin mem multobligitajn, kontraŭleĝe en la tiama politika situacio. Redaktis kaj aperigis plurloke specialajn kursojn, kiuj iĝis bazo por organizita movado en tuta Litovio. En 1974 surbendigis vaste uzatan kurson por memstara lernado. Faris ĉion propranome. En 2001 aperis lia plej grava lernolibro por litovoj: lecionaro, legaĵoj kaj dudirekta vortaro. Lia lasta gramatiko estas nomata Esperanto-poŝlernilo.

En la lastaj jaroj esploris historion de E-movado en Litovio, kompilis biografiojn de 200 famaj litovaj esperantistoj. Okaze de lia 80-jariĝo la Respublika Kulturpalaco sendis dankleteron pro lia multjara kaj sindona laboro por Esperanto.



## Internacia Kongresa Universitato

*Kiel ĉiujare okazis ankaŭ nun serio de fakaj prelegoj, ofte kunlabore kun Akademio Internacia de Sciencoj San Marino.*

**IKU 1: "Eŭropa identeco kaj eŭropa lingvo".** (Zlatko Tisljar).

**IKU 2: Ekonomia tutmondiĝo - ĉu oportuno aŭ minaco?** (Lee Chong-Yeong)

**IKU 3: Komunikado tra la ĉelaj membranoj.** (Eva Paraškeva-Bojaĝieva)

**IKU 4: La interlingvistikaj konceptoj de Wilhelm Ostwald (1853-1932) - okaze de la 150-datreveno de lia naskiĝo** (Detlev Blanke)

**IKU 5: Nanoskalaj duonkondukiloj: Kemia prilaborado de materialoj por estonta elektroniko** (Orlando E. Raola)

**IKU 6: Manksio: eta lando aŭtonomeca kun propra lingvo kaj kulturo** (Marjorie Boulton)

**IKU 7: La geometrio de la komputila ekrano** (Christer Kiselman)

**IKU 8: Ĉu ĉiuj religioj estas sinkretismaj?** (Leif Nordenstorm)

**IKU 9: Instruado de efikaj komunikaj kapabloj al medicinaj studentoj** (Meredith Simon)

## Literaturo

*Dum la tuta kongreso funkciis Libroservo, en kies ĉambro okazis ankaŭ la popularaj aŭtoraj duonhoraj kun prezentado de novaj libroj. Parolis jenaj aŭtoroj: dimanĉe: **Ed Boorsbom, Mark Bavant, Petro Chrdle**; lunde: **Roman Dobrzynsky**; marde: **Nora Caragea, Spomenka Štimec**; ĵaŭde: **Sten Johansson, Ziko M. Sikosek**; vendrede: **Jarło Martelmonto, Rainer Kurz**.*

## La infana kongreseto

25 infanoj el deko da landoj kolektiĝis por pasigi semajnon en esperanta etoso en la 35-a Internacia Infana Kongreseto. Kvar gvidantoj kaj ses helpantoj zorgos pri varia semajno.

La aranĝo okazos en centro kun lignaj kabanaj apud lago, 18 km norde de Gotenburgo. Gepatroj vizitos nin ĵaŭde posttagmeze.

*S. MacGill*


## Ekfunkciis 8S6UEA

8S6UEA - la kongresa amatora radiostacio ekaktiviĝis je la 10-a horo sabate. La gotenburgaj radio-amatoroj helpis starigi la kurtondan stacion kaj antenojn, kaj jam post tri horoj sabate ni faris pli ol 125 radiokontaktojn kun amatoroj en multaj landoj en Esperanto, germana, angla kaj rusa, lingvoj.



## Přerov 80

La 24-an de majo okazis solena kunveno omaĝe al 80-jara jubileo de Esperanto en Přerov. La interesan aranĝon partoprenis ĉirkaŭ 50 esperantistoj el diversaj urboj kaj la solenaĵon ankaŭ kelkaj polaj gesamideanoj, inter ili prezidanto de PEA Stašek Mandrak kaj sekretario de PEA Alexander Zdechlik. Prezidanto de EK Přerov Antonín Krejčíř bonvenigis la partoprenantojn kaj skize informis pri historio de esperanta movado en Přerov. Ĉiu partoprenanto ricevis broŝurojn - en Esperanto kaj en ĉeĥa lingvoj pri detela disvolviĝo de Esperanto dum pasintaj 80 jaroj. Ĉiuj gastoj salutis la kunvenon kun bondeziroj kaj ankaŭ informis pri Esperanta agado en siaj urboj, sekcioj ktp. Posttagmeze interesatoj vizitis aŭ Urban Muzeon aŭ lokomotivan remizon. Post komuna fotografado sekvis babilado kaj poste adiaŭo kaj forveturo hejmen.



## Svitavy 70

La 7-an de junio efektiviĝis jubilea renkontiĝo okaze de la 70-jariĝo de Esperanto en Svitavy. Alveturis pli ol 60 ges-anoj. La soleno komenciĝis per plantado de Esperanto arbo (ruĝfolia fago) en urba parko. Poste sekvis tra-rigardo de belega historia urboplaco, kŭe oni povas vidi interesajn memoraĵojn, inter ili faman preĝejon, kaj fine ankaŭ el preĝeja turo ĉiu povis rigardi la belegan urbon. La organizantoj preparis publike alireblan ekspozicion en Bílý dŭm pri Esperanta movado. Vizitis ĝin ankaŭ loka televidelsendejo, kiu preparis malgrandan raportaĵon pri la jubileo.

Posttagmeze ĉiuj kolektiĝis en la klubejo. Eksonis Esperanta himno kaj bonvenigo de loka kluba prezidantino s-ino Minářová. Honora membro de ĈEA Linhart Rýznar parolis pri historio de Esperanta movado en Svitavy, sekvis videofilmo pri la urbo. La solenon salutis per belegaj kantoj, poemoj, fabeloj knabinoj el Esperanta rondeto, kiun gvidas oferema Zdenka Novotná el Česká Třebová. La historion riĉigis kronikoj. Ankaŭ prezento de ornamado per metalfadeno estis tre interesa. "Ora najlo" estis granda tombolo, ĉiu partopreninto gajnis ian premion. Ambaŭ jubileoj estis modele preparitaj.

*Věra Podhradská*

16-A INTERNACIA ESPERANTO-  
KONFERENCO de OSIEK  
PRAGO 2003-07-19/25

La konferencon sub la devizo **Intimaj temoj en la Esperanto-beletro** aranĝis KAVA-PECH en la 19-a etaĝo de la hotelo Opatov en la samnoma Praga kvartalo por kvardeko da partoprenantoj. En la salono la libroservo de OSIEK proponis ĉirkaŭ 250 titolojn.

Antaŭtagmezoj estis dediĉitaj al literaturaj prelegoj kun interesaj temoj. *Dimanĉe*: **K. H. Mácha – spirita patro de la moderna ĉeĥa poezio** (Vlastimil Kočvara); **Iom pri Prago** (Jiří Patera). *Lunde*: **Intimeco beletra** (Christian Declerck); **Intimajn temojn en la Biblio** (Gerrit Baveling); *Marde*: **La atendado, riĉa je emocioj** (Maria Butan); **La vivon de Eli Urbanová** (Miroslav Malovec, la poetino ĉestis); **Problemoj de la baza radikaro de Esperanto kaj solvopropoj** (Josef Dörr); **Falsaj amikoj en Esperanto, Profesia uzo de Esperanto** (Petr Chrdle). *Merkrede*: **Ĉu aŭtobiografiaĵoj estas literaturo?** (Jean-Luc Tortel); **Antologio Latina kaj Duakanonaj Libroj** (Gerrit Baveling); *Ĵaŭde*: **Kial malkaŝi ĉion?** (Eugene de Zilah); **Intimaj temoj en fikcioj kaj biografioj, Tarokoj kaj epokoj** (Christian Declerck).

Kulmino de la konferenco venis vendrede, kiam en sekreta balotado

estis elektita la greka Rafina por la OSIEK-konferenco 2005 kun la temo *Bizanca kulturo* kaj la OSIEK-premio 2003 estis aljuĝita al Gerrit Baveling, pro la du volumoj de Antologio Latina.

Dum posttagmezoj povis la konferencanoj trarigardi Pragon kun esperantlingva ĉiĉeronino Eva Hajičková (*Preĝejo de Sankta Nikolao, Malnovurba Urbodomo, Venceslao placo, Karola placo, Kastelo*). Vesperojn buntigis koncerto de Miroslav Smyčka kun piannistino Bohuslava Dvořáková (s-ino Kudlíková bedaŭrinde ekmalanis), Nigra Teatro, du vespermanĝoj en restoracio, kiu troviĝas en naskiĝa domo de Franz Kafka, kaj greka vespero aranĝita de la prezidantino Mantha Christou. Merkrede Viŝnja Brankovič prezentis la hungaran urbon Pécs, kiu gastigos la venontan konferencon 2003 kun la temo *Esperanto-gazetaro*.



OSIEK-premio 2003

# Závazná přihláška na 9. konferenci ČES

Litomyšl 17.-19. října 2003

Příjmení:		Jméno :		Titul:	
Adresa vč.PSC:					
telefon vč.předčíslí:			E-mail:		
rodné číslo:			číslo OP (pro ubytování):		
číslo člen.průkazu ČES:			vegetarián <input type="checkbox"/> ano <input type="checkbox"/> ne		

Přihlašuji se závazně na 9. konferenci ČES. Prohlašuji, že jsem si pozorně přečetl/a/ pozvánku a souhlasím s podmínkami pořadatele.

Způsob úhrady (zakřížkujte jednu možnost):

- složeno v Komerční bance a.s. dne.....
- uhrazeno bezhotovostně a mého účtu číslo .....dne.....
- pošlete mi složenku na úhradu poštou

## Objednávám následující:

(zakřížkujte žádané)

**Kompletní služby** - nocleh + stravu Kč 750,-  ano  ne

**Stravu bez ubytování**  
(pro místní účastníky)

bude dohodnuto individuálně

## **Účastnický poplatek**

- člen ČES, platba do 10.10. Kč 150,-  ano  ne
- člen ČES, platba po 10.10. Kč 250,-  ano  ne
- zvýhodněný poplatek do 10.10. - zdarma  ano  ne
- nečlen ČES, platba do 10.10. Kč 250,-  ano  ne
- nečlen ČES, platba po 10.10. Kč 350,-  ano  ne

Dar svazu..... Kč.....

Celkem k úhradě..... Kč.....

Poznámka.....

Datum.....

Podpis.....



## Pozvánka na 9. konferenci Českého esperantského svazu

Vážení přátelé,

výbor Českého esperantského svazu (dále jen ČES) v souladu se stanovami svolává 9. konferenci ČES na dny **17.-19. října 2003**.

Místem konání je Hotel Dalibor, Komenského nám. 1053, 570 01 **Litomyšl**.

### Program:

pátek 17.10. od 16 hodin prezence účastníků, ubytování

18.00 večeře

19.00 beseda s účastníky UK v Goteborgu

sobota 18.10. 8,00 snídaně

9,00 zahájení konference, pracovní jednání

11,30 vystoupení dětí

12,00 oběd

13,30 prohlídka města s průvodcem – esperantistou ,  
zájezd na Růžový palouček

16,00 pokračování konference

18,00-19,00 večeře

19,00-23,00 zábavný večer s tombolou

neděle 19.10. 8,00 snídaně

9,00 pracovní jednání, ukončení konference

### Účastnický poplatek:

člen ČES - při platbě do 10.10. 2003 - 150 Kč, po tomto termínu 250 Kč

(členem ČES se zde rozumí člen v kategorii F - doživotní, nebo členové v kategoriích A, B, D a E - za předpokladu, že mají uhrazeny členské příspěvky na rok 2003 nejpozději v den zahájení konference)

nečlen ČES - při platbě do 10.10. 2003 - 250 Kč, po tomto termínu 350 Kč

zvýhodněný poplatek pro mládež do 30 let a nevidomé členy ČES - do 10.10. 2003 bez poplatku

čestní členové ČES a čestní hosté bez poplatku

**Strava + ubytování** - začíná páteční večeří a končí nedělní snídaní

Snídaně formou švédských stolů, diety či vegetariánská strava možná (prosím uvést na přihlášce)

Cena jednotná - celkem 750,- Kč – vše pod jednou střechou včetně jednacího salonku. Ubytování je dvouúžlkových pokojích s vlastním WC a sprchou, televizí, výtah v objektu.

**Popis cesty k místu konání konference:**

**pěšky** - cca 5 minut (asi 200 m) - **z nádraží ČD** (při východu z nádraží vidíte hotel Dalibor), vlak do Litomyšle jede z Chocně, odjezd z Chocně 14,55 hod., 17,16 hod. - **autobusové nádraží** – asi 15 – 20 minut (podchodem pod hlavní silnici k řece a podél řeky až k hotelu – zajistíme kontaktní osobu na nádraží ( přes Litomyšl jedou autobusové linky Brno- Hradec Králové nebo Olomouc – Hradec Králové, Pardubice)- prosíme uvést poznámku na přihlášce o době příjezdu

**automobilem** - příjezd od Vysokého Mýta, Hradce Králového - po ulici Sokolovská, za Penny marketem na křižovatce vlevo (hotel je u křižovatky u hlavní trasy průjezdu městem Litomyšl), při příjezdu od Svitav, Brna – za světelnou křižovatkou, 2 nadchody na křižovatce vpravo (po levé straně bude autocentrum Fiat).

V pátek 17.10. 2003 bude na autobusovém nádraží fungovat naše informační služba o kterou požádáte při přihlášce..

Během konference budete mít možnost zakoupit esperantské zboží v Libroservu ČES. Libroservo bude na konferenci výhradním prodejcem, pokud si přejete nabídnout k prodeji svoje E-předměty, pak pouze jeho prostřednictvím. Neesperantské zboží nebude dovoleno prodávat.

Vkládání reklamních materiálů do tašek pro účastníky a jakákoliv další propagační činnost jsou možné po předchozí dohodě s výborem ČES.

Taktéž budete moci na místě zaplatit členské příspěvky ČES, UEA a předplatné esperantských časopisů.

Úhrada účastnického poplatku je možná těmito způsoby:

a) složením příslušné sumy v kterékoliv pobočce Komerční banky a.s. na konto ČES č. **3330-021/0100**, variabilní symbol **10009**, konstattní symbol **0308**. Nezapomeňte na složním lístku uvést své jméno a příjmení. Vklad je bez poplatku.

b) bezhotovostním převodem z Vašeho účtu - nezapomeňte uvést v.s. a k.s.

c) na vyžádání Vám pošleme složenku. Vyplňte prosím čitelně, úplně a černou propisovačkou (nebo tenkým černým fixem). Poplatek dle poštovních tarifů.

**Přihlášky** pošlete pokud možno **do 10. října 2003** (rozhoduje datum poštovního razítka) na adresu **Český esperantský svaz, Poděbrady, Lesní 150/VI**

Stornovací poplatky: při odhlášení do 10. října 2003 (dle pošt. razítka) Vám bude odečteno 10% ze zaplacené částky na nezbytné náklady, po tomto termínu 20%.

Těšíme se na shledanou v Litomyšli.

Věra Podhradská, v.r.  
předsedkyně ČES

Stornovací poplatky: při odhlášení do 15. října 2003 (dle poštovního razítka) Vám bude odečteno 10% ze zaplacené částky na nezbytné náklady, po tomto termínu 20%.

Těšíme se na shledanou v Litomyšli.

Věra Podhradská, v.r.  
předsedkyně ČES





## Ĉion kulpas viroj

Kial mi estas, kia mi estas? Kial min interesas, kio min interesas? Kial mi verkas, kiel mi verkas? Klaraj demandoj postulas klaran respondon. Ĉi tie ĉi estas:

Ĉiun kulpis viroj. Ne nur Alan, kiun min sukcesis deflori ... Ne nur Ŝtefo, kiu al mi donis Pragon, pli belan nomon kaj Esperanton ... Ne nur Julio Baghy, nia romantika kaj reciproke inspira rilato... Ne nur Johano kaj lia amiko Sinha, kiu nin foje informis pri kvin pacprincipoj de panĉaŝila - neatakado, nenemiksiĝo, obstine kaj ĉiam severe paroli la veron, lasi ĉiun vivi laŭ sia propra vivo, persista kunlaboro -, laŭ kiu Esperanto estas kiel fenikso, ju pli oni frotiĝados pri ĝi, des pli ĝi brilos ... Ne nur Ernesto, kiun mi unu tagon renkontis en la valo Ŝárka, kie pluvus dufoje ...

Mi ripetas, ĉion kulpas viroj. Kiu tute neatendite degelis super Sapfa verso de komencanta poetino? Ja Pumpr! Tomáš Pumpr! Kiu iniciatis la aŭtobiografion *Hetajro dancas*? Ja Rumler! Laŭdire "ĉiĝ estas komunikebla" Jozefo, Jozefo, ci fripono! Kia miro, ke Ulrich Becker poste skribis: "Uf! Nekredeble! Ĉu

tio eblas en Esperanto? Ĉu la movado tion eltenos? Io tia ne ekzistas ĉe ni, kaj en kelkaj literaturoj tiaj libroj kapablas haltigi promesplenajn karierojn kaj kaŭzi politikajn krizojn." Bone, mi pentas. Tamen kiu tiun skandalan verkon eldonis? Ja Bays! Gersi Alfredo Bays! Hu, li riskis!

Jes, ĉion kulpis viroj. Kulpe de Ed Borsboom mi de la jaro 1997 apartenis inter "favorantojn" de OSIEK (Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj)... Kulpe de Petro Chrdle ĵus aperis mia adiaŭa kolekto **Rapide pasis la temp'**... Belaj birdetoj! Esti juna, mi scius kiel ilin puni!

*Eli Urbanová*



## Kiel la uniformo de ĉeĥa



### kolonelo propagandis Esperanton en Pireneoj

Fine de majo okazis en la fama franca Lurdo tradicia renkontiĝo de soldatoj el la tuta mondo. Ankaŭ la ĉeĥa armeo sendis unu aviadilon kun soldataj pilgrimantoj, kiuj dum di-servoj kaj Kalvaria vojo reprezentis nian landon. Sed ne ĉiuj, ĉar du, sankta Bernardeto pardonu nin, tuj post la alflugo telefonis al esperantisto Jacques Morin, kiu ekaŭdinte Esperanton reagis: "Mi tuj prenas aŭtomobilon kaj dum duonhoru mi estos en Lurdo!" Kia estis nia surprizo, kiam alveturis fortika barba viro jam pli ol okdekjara, sed kun tia temperamento kaj energio, ke ĉiuj kvindekjaraj povus nur envii. Sekvis belega ekskurso en la koron de Pireneoj Gavarnie, kiu situas ĉe la franc-hispana landlimo. Alteco de la ĉefa kresto atingas ĉirkaŭ tri mil metrojn. Tiu dua homo, kiu eskapis el Lurdo, estis mia kunlaboranto kolonelo D-ro Majer, kiu neniam antaŭe kredis, ke Esperanto povus praktike funkcii. Do mi decidis preni lin ankaŭ.

En unu vilaĝeto ni forlasis

aŭtomobilon kaj piede marŝis en montaron. Jacques nekredeble rapide piedmarŝis sur mallarĝa vojeto kaj turistoj, kiuj pasis nin, povis aŭdi lian sonoratan Esperanton. Fremda nekonata lingvo ne estis en tiu turisme konata regiono stranga okazo, sed la parada uniformo de la ĉeĥa kolonelo kun medaloj kaj oraj ŝnuroj certe jes! Turistoj en firmaj botoj kun dorso-sakoj nekredeble rigardis kolonelon kun duonŝuoj kaj fotoaparato kaj demandis, el kia lando li venis. Jacques volonte eksplikis ĉion kaj ne forgesis emfazi, ke ni ne parolas ĉeĥe, sed esperante. Mi devas konfirmi, ke la intereso de Francoj pri Esperanto estis tre granda. Ĉar ni renkontis ankaŭ Eŭskojn kaj Nederlandanojn, la propagandado de nia lingvo estis fakte internacia. Post agrabla tempo en montaro kaj poste en hejmeca gastejo ni revenis en Lurdon.

Ankaŭ ceteraj pilgrimantoj travivis belegan tagon, sed mi estas certa, ke niaj travivaĵoj estis tiel same transcendaj, kiel travivaĵoj de tiuj, kiuj restis en Lurdo. Sed tio plej grava okazis nur post nia reveno hejmen. Kolonelo Majer komencis lerni Esperanton! Do ŝajnas, ke mi ne restos unusola soldato-esperantisto en tuta Esperantujo.

*Jiří Caletka*

## Semajna lingva seminario

en pensiono ESPERO en vilaĝeto SKOKOVY de 22-a ĝis 29-a oktobro 2003. Instruado en grupoj, promenoj, ekskursoj, jogo, prelegoj. Post interkonsento masaĝoj kaj kuracistaj konsultoj. Vi povas elekti programe-rojn laŭ vetero, gusto, tempo, lingvo-scio, ktp. Oni pagas surloke po 295,- CZK tage, partoprenkotizo 150 CZK; (1 Euro = 33 CZK). Pli detalajn informojn petu ĉe: *Jindřiška Drahotová, Sadová 745/36, CZ-293 01 Mladá Boleslav, tel. 00420/326 731 845 vespere; rete:*

*drahotovaesperanto@seznam.cz*

*vanekmi@centrum.cz*

*ttt: www.mlboleslav.cz/esperanto*

## Ústí nad Labem

E-klubo en Ústí n.L. invitas vin al sia **16-a Internacia kultura festivalo**, okaz. la 26-28. 9. 2003 kun societa vespero vendrede, prelega matineo kulturtema, homaranisma spirita koncerto kaj bunta kultura vespero sabate - ĝis dimanĉa ekskurso al holokaŭsta koncentrejo en Terezín. - Detalaj invitiloj kun aliĝiloj ĉe intereso sendotaj. Simila invito al **23-a Ĉeĥa-Saksa Tago** 6. 12. 2003 en nia urbo. Aliĝu ĉe: Miroslav Smyčka, Kojetická 90, 400 03 Ústí nad Labem rete: *m.smycka@seznam.cz* aŭ *j.kriz@volny.cz*

## Vizito en Ratiškovice

La 20 -an de junio veturis malgranda E-grupeto el Česká Třebová en vilaĝon Ratiškovice. Ni estis invititaj de Jana Melichárková kaj ŝiaj E- infanoj , kun kiuj ni ĝemeliĝis jam antaŭ kelkaj jaroj .Post nia alveturo vendrede ni iris kōmune naĝi en basenon, sabate viziti valon, kie printempe floras adonido printempa , kaj kastelon Milotice. Dimanĉe ni kunvenis en la lernejo, kie infanoj el ambaŭ grupetoj prezentis sin en kultura programo: en fabeloj , kantoj, teatraĵetoj. S-anino Jana Melichárková rakontis al infanoj pri UK en Brazilio, kiun ŝi ĉeestis. Infanoj estis tre kontentaj. Nun jam ili serĉas, kion prepari por nia ĝemela grupeto en estonta jaro.

*Zdenka Novotná*

## Uzitajn poŝtmarkoj ne forĵetu

Se vi ne havas por ili alian uzon, oni povos por ĉiu el ili akiri por malsanuloj el la tria mondo proksimume pecon da pano. Se vi sendos kolektitajn uzitajn poŝtmarkojn al AEH (Na Okrouhlíku 953/21, 530 03 Pardubice), ni aranĝos ĉion pluan. La poŝtmarkoj povas esti ankaŭ nur fortonditaj kun resto de la koverto. Ni antaŭdankas.

L. Srbová



## Printempa turisma renkontiĝo en Plasy

Ĉi jare ĝi okazis de la 19-a ĝis la 22-a de junio. Nome de la E-klubo en Plzeň preparis kaj estris ĝin (bonege!) s-ano Václav Kaprál el la proksima Kaznějov.

Simple komforta loĝado en kabanjo de refreŝiga centro "Máj", bongustaj manĝaĵoj, belega naturmedio = oportuna ŝanco!

Ĵaŭde alvenis 20 gesamideanoj kaj tuj vespere ni kunvenis, interkonatiĝis, babilis. Vendrede antaŭtagmeze ni vizitis la urbeton Kožlany, en la loka muzeo ni spektis ekspoziciojn pri prezidento Edvard Beneš, pri la lokaj historio kaj potfarista tradicio kaj iaman lerneĵĉambbron. Survoje en Kralovice ni ĝuis kafon kaj glaciaĵon. Posttagmeze okazis piedpromeno ĝis la proksima vilaĝo Nebřežiny, naskiĝloko de Václav Levý, elstara skulptisto de la 19-a jarcento. Vespera videofilmo al ni montris distrikton Plzeň-sever (Pilseno-nordo), kaj s-ano Vlado Sládeček projekciis siajn diapozitivojn. Sabate antaŭtagmeze okazis vizito en Manětín (baroka perlo de okcidenta Bohemio), trarigardo de la loka kastelo. Posttagmeze, invititaj de la loka fotoklubo en Plasy, ni en tiea fama kastelo ĉeestis solenan inaŭguron de la klubo fotoekspozicio, nomita „Konfeso al Plasy kaj la ĉirkaŭaĵo. Siajn verkojn prezentis tie

Ivo Kornatovsky kaj Jaromír Nový. Vespere ni vidis videofilmon pri iama

E-renkontiĝo en Chrástná kaj poste s-ano Sládeček kantigis nin ĉe sia gitaro. Dimanĉe restantaj partoprenantoj vizitis en Plzeň ĉarman meditaĝardenon, kiun post sia liberigo fondis kaj konstruis s-ro Luboš Hruška, arestito en totalismo, kiel memorigan monumenton al viktimoj de malbono. Post tagmanĝo ni adiaŭis, esperante renkontiĝi en Plasy venontjare.

Nunjare venis ankaŭ eksterlandaj amikoj - s-anoj Claude el Lille kaj Peter el Plauen. Do, la renkontiĝo fariĝis internacia - ĉu nova tradicio?!

*Mirek Severa*



## Esperanto-tago Pardubice

Ĉijare okazos la 20-an de septembro 2003 (sabato). Informojn petu ĉe Jarmila Rýznarová, Na Okrouhlíku 953/21, 53003 Pardubice

## **Eŭropa Jaro de Handikapuloj**

"Malkonstruu ne nur la fizikajn barojn, malkonstruu ankaŭ la lingvajn-kulturajn barojn por la internacia agado de handikapitoj!"

Tion emfazas d-ro Renato Corsetti, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio (UEA), kiu kune kun la prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU), d-ro Sen Riain kaj Jarmila Rýznarová, prezidantino de Asocio de Esperantistaj Handikapuloj (AEH), verkis deklaron okaze de la Eŭropa Jaro de Handikapuloj. AEH, kiu ekde 1996 estas faka asocio de UEA, okazigas regule internaciajn kongresojn kaj eldonas propran bultenon.

"Problemario de personoj kun diversaj handikapoj estas malfacila afero. Certe estus bonega kaj estus tio nia sincera deziro, helpi al ĉiuj senpovaj homoj sendepende de la speco de handikapo ne nur korpa, sed ankaŭ por la homoj de malbona sociala sekuriĝo kaj lingvaj obstakloj. Estus ideala, se handikapitaj homoj de la tuta mondo povus akiri egalrajtecon de sia pozicio en la socio pere de internacia lingvo Esperanto," esperas s-ino Rýznarová kaj asertas: "Bonan sukceson al handikapuloj de la tuta mondo eblus atingi nur per unusola komuna internacia lingvo Esperanto."

## **Deklaro okaze de la Eŭropa Jaro de Handikapitaj Personoj**

La jaro 2003-a estis deklarita Eŭropa Jaro de Handikapitaj Personoj. La Esperanto-movado tra unu jarcento kreis komunumon, kiu estas tre malfermita al homoj "malsamaj", al homoj kun socie marĝenaj pozicioj, al homoj kun fizikaj malavantaĝoj. En nia komunumo fakte agas kelkaj asocioj de parolantoj de Esperanto kun malavantaĝoj. La plej ĝenerala estas la Asocio de Esperantistaj Handikapuloj, sed estas aliaj, ekzemple la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj.

La devizo de la Eŭropa Jaro de Handikapitaj Personoj estas "Ĉiuj en la vagonaron!", alivorte la eŭropa komisionano Anna Diamantopoulou volas montri per tiu devizo la malferman sintenon de eŭropaj instancoj al 10% de la eŭropa loĝantaro, kiuj suferas pro malavantaĝo fizika de ajna speco.

Same la prezidanto de la Eŭropa Federacio de Handikapuloj asertas, kunlige kun la jaro, ke handikapuloj estas plenrajtaj civitanoj de sia socio, kaj devas esti traktataj kiel tiaj.

La Esperanto-movado ĝenerale batalas por solvi la lingvan kaj kulturen malavantaĝon de homoj, kiuj, ne parolante la fortajn lingvojn de la momento, estas konsiderataj duaklasaj civitanoj ofte en sia lando mem.

Ni volas ke ankaŭ parolantoj de lingvo de malpli grandaj landoj estu konsiderataj plenrajtaj civitanoj de la Eŭropa Unio kaj de de la respektivaj naciaj socioj.

En tiu senco la streboj de la Eŭropa Jaro de Handikapitaj Personoj estas tuj kompreneblaj por parolantoj de la internacia planlingvo Esperanto, kiuj deziras ke ĉi tiu jaro estu okazo por efektiva plibonigo de la situacio en ĉi tiu kampo. Samtempe ni invitas la eŭropajn instancojn forigi la lingvajn kaj kulturajn BAROJN por ĉiuj eŭropanoj kaj ni invitas la handikapitajn personojn lerni Esperanton por iĝi membroj de sendiskriminacia komunumo, en kiu ĉiu estas samvalora homo.

Ni malkonstruu la lingvajn-kulturajn barojn por la internacia agado de handikapitoj!

*Eŭropa Esperanto-Unio  
Universala Esperanto-Asocio  
Asocio de Esperantistaj  
Handikapuloj*

## **Veto je la pluvivo de BKC en 2004**

Ni, prezidantoj de EEU kaj UEA, kredas, ke la pluvivo de Brusela Komunikad-Centro en 2004 estas necesa por la asistado al kaj vigligado de la Landaj Asocioj en sia informado pri egalrajteca traktado de la lingvoj en Eŭropo kaj pri Esperanto.

D-ro Esperanto en 1887 petis la legantojn de la unua broŝuro promesi,

ke ili eklernos la internacian lingvon, kiam 10 000 000 aliaj personoj estos farintaj la saman promeson.

Same en 2003 Eŭropa Esperanto-Unio petas vin promesi unufojan donacon de almenaŭ 1/2 % de via jara enspezo por Brusela Komunikad-Centro, kiam la totalo de tiuj donacoj ebligos la pluekzistadon de BKC en 2004. (Laŭ takskalkulo tiu pluekzistado de BKC estos garantiita, se 250 personoj faros tiun-ĉi promeson.) La promeso implicas, ke vi efektive pagos la sumon al la kasisto de via Landa Asocio aŭ al la konto 'Eŭropo' de UEA antaŭ la 31-10-2003a.

Tuj kiam - en malfavora kazo - la direktoro de BKC ricevos sciigon de maldungo ekde 1-1-2004a, ĉiuj kasistoj de Landaj Asocioj estos petataj repagi la sumojn donacitajn al vi. Tuj kiam estos decido, ke BKC pluvivos dum 2004, la kasistoj estos petataj

1. transpagi la donacitajn sumojn al Eŭropa Esperanto-Unio
2. informi vin pri tiu transpago (Se estas ia reduktebleco de impostoj en via lando, rilata al via donaco, li ankaŭ informos vin pri tio)

*Seán Ĝ Riain, prezidanto de Eŭropa  
Esperanto-Unio  
Renato Corsetti, prezidanto de  
Universala Esperanto-Asocio*



## LA DOMO estas revuo ankaŭ por vi

*Ĉu vi scias, kiel esperante esprimi la ĉehan vorton "strop"? Certe vi ne scias. Legu do!*

LA DOMO estas eldonata de Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj (TAKE), sed la revuo estas orientita pli ĝenerale, ĝi vaste dediĉas lokon al ĉiuj profesioj kaj servoj. Ĝi eldonatas en Francio ĉiun trian monaton, aperas do kvar dudekpaĝaj numeroj jare. Unujara abonpago rabatita por eksaj socialismaj landoj estas 10,5 eŭroj, dujara abonpago 17 eŭroj (proks. 544 ĉehaj kronoj). Turni vi povas al: LA DOMO - André Grossmann, 5, chemin des Pyrénées, FR-68390 BALDERS-HEIM, Francio. Informojn pri TAKE kaj la revuo vi povas peti ankaŭ ĉe: J. Werner, Dřínová 18, 612 00 Brno.

En la 38-a n-ro de LA DOMO, aperinta en aprilo 2003, estas escepte grava la artikolo de Jan Werner titolita "Aktuale pri la nocioj planko kaj plafono". La aŭtoro en ĝi analizas la fakajn nomojn "planko" kaj "plafono" kaj trovas, ke planko por francoj, angloj kaj ceteraj okcidentanoj ne estas sole nia "podlaha", sed ankaŭ nia "strop", dum por slavaj kaj germanaj esperantistoj nun estas nia "strop" sole kaj neŝanceleble "plafono". Male por okcidentanoj, krom germanoj, "plafono" estas egala al nia "(stropní) podhled" kaj al la germana "Untersicht". Plafono estas por ili nur tio, kio estas videbla en ĉambro supre, sed ne la masiva porta konstrukto

nomata ĉeĥe, slovake, pole "strop". Kie estas kaŭzo de la grava miskompreno? Bedaŭrinde eraris jam L. L. Zamenhof, kiu en la seslingva Universala Vortaro per ekvivalentoj ĝuste difinis plankon kiel tavolon, sur kiu ni paŝas (plancher; floor; Fussboden; pol: podlaga), sed mise difinis plafonon en la germana: Zimmerdecke. En la ceteraj lingvoj "plafono" laŭ Zamenhof estas: (fr) *plafond* - (en) *ceiling* - (ru) *nomolok-(pl) sufit*, kiuj signifas "stropní podhled", ne "strop". Zamenhof forgesis enkonduki esperantan vorton por la ĉefa interetaĝa horizontala konstrukto de domo, kiu estas inter planko kaj plafono. Kaj tiu stato hontinde daŭras ĝis nun.

La mankon trovis J. Werner tute hazarde pro aperinta miskompreno en profesia traktado kun kolegoj en Francio, Nederlando kaj Brazilo. Fine de la analizo li proponis por la nocio, ĝis nun sen esperanta termino, novan nomon laŭ la latina tectum, nome tekto. Ĝi jam estas ĝenerale aprobata de la gekolegoj, kun kiuj J. Werner kontaktas. Tekto estu ne nur konstrufaka termino, sed ĝi nepre estu ankaŭ ĝenerala nomo en la komuniza lingvo-praktiko de esperantistoj. Ekuzu ĝin ankaŭ vi. Ne miksu plu la nocion de domstrukturo "tekto" kun la kompletigaj partoj de domkonstruo "planko" kaj "plafono".

*we, 2003-07-02*

## Verko pri esperantologio en la ĉeĥa lingvo

La verko de Detlev Blanke "Interlingvistiko - Enkonduko en la fakan literaturon" aperos en la ĉeĥa danke al la eldonejo KAVA-PECH. Tradukis ĝin Miroslav Malovec, kiu ankaŭ aldonis ĉapitron pri la situacio en Ĉeĥio. Oni supozas, ke la verko aperos sur la bretoj de ĉeĥaj librovendejoj en ĉi-jara aŭtuno. Post longa tempo ni havos verkon, kiu povas bone informi la ĉeĥan publikon pri Esperanto en la kunteksto de interlingvistiko. Tamen, multe dependos de la aktiveco de esperantistoj, ĉu librovendistoj efektive mendas ĝin kaj ĉu ĝi do efektive estos ofertata en niaj librovendejoj.

*Petr Chrdle*

## Sekcio de informadiko

Proksimiĝas konferenco de ĈEA en Litomyšl, dum kiu ni havos eblecon kunsidi kaj pritrakti:

- 1) Faritaj, farataj, farotaj laboroj
- 2) Informoj el Svedio - UK kaj ILEI konferenco
- 3) Diskuto, diversajtoj.
- 4) Laborplano, konkludo.

*Josef Vojáček*

## Esperanto en televido Nova

La 27-an de julio 2003 la komerca televido Nova prezentis interparolon kun ing. Zdeněk Pluhař pri Esperanto. Sed poste ili demandis surstrate preterpasantojn per Esperanta frazo kaj finis per konkludo, ke Esperanton neniu parolas nek komprenas.

## Esperanto en enciklopedia historio

En librovendejo mi vidis enciklopedion pri la 19-a jarcento, en kiu estis Esperanto menciita inter gravaj inventoj de 1887, kvankam la informoj pri Zamenhof estis iomete eraraj. (M. Malovec)

## Dostojevskij en Esperanto

La eldonejo Sezonoj en Kaliningrad (antaŭe Jekaterinburg) preparas gravan projekton eldoni la verkaron de F. M. Dostojevskij en Esperanto. En la unua volumo 2002 sub la nomo *Blankaj noktoj* aperis rakontoj *Malriĉaj homoj*, *Sozio*, *Honesta ŝtelisto*, *Blankaj noktoj*, *Misfortuna historio*, *Noticoj el la kelo*. En la dua volumo duafoje eldoniĝos *Puno kaj krimo*, poste sekvos *Idioto*, *Demonoj* kaj *Fratoj Karamazov*.

## Nova Esperanto-strato en Belgio

La 10-an de julio la nova Esperantolaan (Esperanto-strato) estis malfermita al la trafiko ĉe la limo de la urbo Oostende, en Belgio. Tiu kvartalo estas nova industria- scienca areo kie universitataj kaj teknikaj entreprenoj lokiĝos.

## Mallonga rakonto pri formala renkontiĝo de Via estraro

Matene renkontiĝis ni plennombre - sep gravuloj sidis ĉe tablo. Konstantaj kunlaborantoj trovis sian vojon ankaŭ - jen ĉefoj de revizia komisiono, Starto, libroservo kaj pedagogia komisiono.

Svarmas niaj pensoj, moviĝas niaj buŝoj, bruo atakas duondormantajn najbarojn. Solena tosto por nia kolemino - jubileantino Libuše Dvořáková silentigas la forumon. Sincera danko al ŝia gastiganta familio flosas en aero.

La atmosfero iĝas formala ...

\* La sekretario elpoŝigis faktojn pri nia asocio - ni estas 796 membroj el kiuj 385 ĝisvivaj.

\* Financa situacio de la asocio minacas al ni - por resto de la jaro ni disponas je ĉirkaŭ 37.000,- kronoj, se ni ne havos alian enspezon. Kiu solvadu la (kelkjaran) situacion? Ĉu sekretario, ĉu estraro, ĉu konferenco? Ne temas pri "kiu" sed pri "kiel" - viaj receptoj kaj instigoj bonvenas.

\* Problemas retpaĝo pri la asocio - ĝin ni malfacile aktualigas kaj neniu estrarano havas specialan scion prilabori ĝin. Ĉu eble vi?

\* Atentu! La konferenco de ĈEA okazos inter 17.-19.10. en Litomyšl. Vi trovas ĉiujn necesajn informojn en tiu ĉi numero de Starto. Ni detale

diskutis financan, organizan kaj programan flankon de la konferenco.

\* Dum la konferenco haveblos aktualigita gvidbroŝuro de la asocio.

\* Ĉu ni denove kune kaj distre pli perfektigu niajn lingvosciojn? Paroliga kurso okazos en Dobřichovice ĉe Prago dum 28.-30.11.2003

\* Ni atente aŭskultis novaĵojn en niaj kluboj kaj sekcioj.

\* Petr Chrdle, la estrarano pri eksterlandaj aferoj, parolis pri traktado kun GEA (Germanio) kaj SKEF (Slovakio) kaj pri tenado de tradicio de bona kunlaboro.

\* Jen ĝoja informo el pedagogio komisiono - ĝia gvidantino Jana Melichárková post kelkjara instrua laboro finpretis sian libron "Esperanto por infanoj" (ilustrita de Mirka Tomečková). Ĝin vi povas aĉeti en nia Libroservo aŭ dum venonta konferenco.

\* Kelkaj estraranoj diskutas interretan Esperanto-kurson en ĉeĥa versio.

Lacas niaj cerboj, lacas niaj buŝoj ...

Ĉu gravuloj ni estis? Ĉiu diru laŭ si mem - por mi ni restas entuziasmoj ordinare klopodante plenumi siajn taskojn.

*Svitavy, 31.5.2003*

*Lucie Karešová*



## Vizitu Someran Esperanto – Tendaron en Lančov

Se vi dezirus reveni al viaj skoltaj tempoj kaj ĝui atmosferon de somera tendaro - nepre vizitu Someran E-Tendaron en Lančov situata en ĉeĥa Suda Moravio. Ne estas facile trovi ĝin kaŝitan en arbaro, ĉe la aŭstra limo, apud granda valbaraĵo Vranov. Bona Dio starigis sur nia vojo ĉeĥan E-familion Filip. Laŭ interreta interkonsento Libuše kaj Míša enbusiĝis survoje apud ilia domo, partoprenis kun ni la programon en tendaro, eĉ instruis E-on al parto de nia grupo, kaj same revenis hejmen al Chropyně.

Dum la reenvojaĝo ili montris al ni belegan Kroměříž, kie en la pasinta jaro okazis la kongreso de IKUE. Sen navigado de Míša ni probable serĉus ĝis hodiaŭ vojon por nia aŭtobusego.

Apud la tendaro, kiam la arbara vojo okazis nekredeble mallarĝa, ni ekvidis novan baron: malgrandan ponteton sur la rivereto. Mi fermis okulojn kaj murmuris "Patro nia..." kiam la ŝoforo trankviligita de Míša pasis ĝin senprobleme. Probable same timis aliaj, ĉar ĉiutage, post la pasado de ponteto grupanoj laŭte aplaŭdis. La tendaro dank' al Věra Podhraská kaj Pavel Sittauer funkcias jam 51 jarojn. Lignaj kabanoj sur arbara kampo ĉirkaŭas la maston kun E-a kaj ĉeĥa flagoj. Longaj lignaj tabloj sub ĉielo servas por manĝantoj. Se pluvus, oni

povas aranĝi ĉion en ĉambrego apud la kuirejo. Anstataŭ vekhorloĝo matene tra la kampo iradas estraranoj kun gitaro kantante "Vekiĝu, ho dormantoj, jam vokas la kukol'..." Antaŭtagmeze okazadas grupa instruado de diversaj lingvoj, ĉar fakte klubo en Třebíč okupiĝas ne nur pri Esperanto. Poste poloj gimnastikadis laŭ la ĉina maniero kaj lernis E-kantojn. Ĉiun posttagmezon ni ekskursis: al valbaraĵo kaj kasteloj de Vranov, Bítov, pitoreskaj urboj Telč kaj Znojmo. Unu tagon ni pasis en apuda Vieno. Akompanis nin ĉeĥa longpie- da barbulo Vratislav, sen kiu ĉio ne okazus same facila por aranĝi. Vespere viciĝo apud la masto, komuna kanto por adiaŭi pasintan tagon kaj hisado de la flagoj. Intertempe naĝado, promenado... Mankis tempo por enuo. Ankoraŭ tendara lignofajro, konkurso pri Esperanto, kaliko da vino en proksima kafejeto... Nokte, laŭ skolta maniero, deĵorantoj gardis nian tendaron. Kiel amuze estis sidi kun novaj kaj malnovaj geamikoj ĝis noktomezo sur la benko apud la kabano kaj babili esperante.

Ĉu vi kredas, ke la kuiristino nutris nin kiel infanojn 5-foje tage? Tiel bongustan panon kun porka graso miksitita kun kuracaj herboj kaj bulbo oni povas gustumi ĉe ni nur en iu malnova gastejo. Ĉeĥaj kaj polaj

pladoj ĝenerale diferencas, sed neniu plendis pro menuo. Ĉeĥa lingvo similas al la pola, sed havas tute alian prononcon. Similaj vortoj ne ĉiam havas la saman signifon, kio ofte tre ridigas nin.

Vĉra kaj Pavel estis kiel gepatroj paciencaj je infanaj kapricoj de ĉiuj, kiuj venis. Neeblajn aferojn ili solvis tuj, je mirakloj ni devis atendi momenton. Ĉiam ridemaj kaj plenaj de bona volo tamen ili bezonas helpon de monda esperantistaro. Jaron post jaro malkreskas la nombro de E-partoprenantoj de SET. Mono, kiun ili postulas por 1-taga restado estas vere simbola. Do, ili ĉiam serĉas sponzoron por restaŭrigi ion aŭ plibonigi kondiĉojn de restado. Nia grupo akceptis varme ĉion krome kondiĉojn de lavado. La pavilono kun kuranta akvo kaj 2 duŝoj estas simple modesta por infanoj, sed plenkreskaj virinoj atendis iomete pli. Tamen ankaŭ bjalistoka instruistino, kiu en la jaro 1972 partoprenis SET en Lanĉov kun infanoj ĝis hodiaŭ varme kaj eŭforie rememoras la restadon en tendaro.

Rondo cirklas. Se esperantistoj ne venos - organizantoj ne havos monon por restaŭrigi ion. Gloro al ili, ke ili sukcesis gvidi la tendaron en malbona tempo de baroj kaj ordonoj. Se vi venos - admiru belegajn memorlibrojn el pasintaj jaroj kaj serĉu nian paĝon. Ni venis - partoprenis kaj iam revenos por partopreni denove, ĉar al ni la restado vere plaĉis.

Ekkuraĝu kaj vizitu SET-on en Lanĉov en Suda Moravio: valoras!

*Bjalistoko, la 1-an de aŭgusto 2003*

*Nome de la pola grupo*

*Ela Karczewska*

*kaj Nina Pietuchowska*

*Bjalistoka Esperanto-*

*Societo/Pollando*

## Ĉu vi scias itale?

SET Lanĉov ĉijare enkondukis la kurson de la hispana lingvo kaj deziras venontjare enkonduki ankaŭ la italan, sed mankas instruisto. Se vi scias ĉi tiun lingvon, vi povas kontakti la klubon Esperanto, 674 01 Třebiĉ.

## 6-a Renkontiĝo de Eksaj Tendaranoj

Ĉijare kolektiĝis en Lanĉov (8-10.8.2003) trideko da personoj, kiuj partoprenadis la tendaron kiel gejunuloj. Bonvenigis ilin viando de freŝe buĉita porkido, sed bedaŭrinde ne eblis tendarfajroj pro ekstrema sekeco minacanta bruligi arbaron. Da akvo en la lago estis malmulte, sed tio ebligis pli oportunan banadon, ĉar la bordaj plaĝoj fariĝis multe pli larĝaj. La akvo estis varma kiel teo. Venontjare okazos jam la 7-a renkontiĝo.

El la historio de Lančov

## Delegacio de Kleriga instituto vizitis SET-on.

En la jaro 1960 ekzistis Ĉeĥoslovaka E-komitato, kiun direktis la Kleriga instituto en Praha. La instituto delegaciis por kontroli SET-on, sinjorinon estrinon Mansfeldová. Al tiu ĉi nobela virino, kiu neniam vidis normalan tendaron, nenio plaĉis. Ĉe la tendaro tendumis en sia propra tendo unu pola kuracisto esp. kun sia familio. Laŭ ŝi ni ne darfis inviti eksterlandanojn. Vane mi kontraŭstaris ŝin, ke ni ne invitis ilin, ke ili legis pri nia tendaro en Heroldo kaj pro tio venis. La samon klarigis al ŝi la pola kuracisto. Bedaŭrinde, ŝi ne volis kompreni. Aŭtune venis la dokumento de ministerio de lernejoj kaj kulturo, kiu malpermesis al ni por venanta jaro organizi SET-on. Ni do devis solvi la problemon. La plej bona estis ideo de unu el organizantoj Vl. H., kiu estris tiam distriktan organizon de Svazarm (organizon por kunlaboro kun la armeo). Sufiĉas 5 personoj por fondi la bazan organizon de Svazarm ĉe Kleriga domo en Třebíč, kies rondeto ni estis, kion ni plenumis. La problemo do estis solvita. Per aŭto de la d.o. Svazarm ni transportis al tenduma loko necesajn, kontraŭkemiajn aĵojn, ekzemple la kaŭĉukajn mantelojn, kontraŭgasajn maskojn, diversajn

aparatojn ktp. Por kelkaj minutoj ni ludis kiel soldatoj kaj fotis kaj fotis. Poste ni sendis fotojn al M de L kaj K kun raporto, ke la tendaro okazos kiel defenda, ke enĝi okazas la defendaj ludoj kaj krom tio oni instruos ankaŭ internacian lingvon E.

*Pavel Sittauer*

## Propono de Ĉeĥa Poŝto



Ĉiu klubo povas havi sian propagandan poŝtmarkon. Pretigas: Česká pošta, OZ DOS, Ortenovo nám. 542/16, 170 24 Praha 7, tel. 251 036 249, fax 220 875 546, e-mail:

petrusova.michaela@ozdos.cpost.cz  
Sur unu folio estas 9 poŝtmarkoj kun 9 kuponoj, sur kiujn eblas alpresi tekston, desegnon, eĉ koloran foton (por unu folio unu motivo). Unu folio kostas 155,60 Kč (57,60 Kč poŝtmarkoj, 98 Kč kuponoj kun alpresaĵo). Aŭtune aperos ankaŭ 9-kronaj poŝtmarkoj.

*Vlado Sládeček*



## Lingvaj ludoj kaj enigmoj (14)

Solvo de la enigmoj el la antaŭa numero:

25. *gvidi - vidi*

26. *por tabelo - sporta bela*

Analoga al la antaŭaj enigmoj (almeto, demeto) estas

### ENMETO kaj ELMETO

En ĝi temas pri du esprimoj, kiuj diferencas per unu plia aŭ malplia litero interne de ĝi. Oni do povas enmeti (enŝovi) en la esprimon la literon aŭ male elmeti (elpreni) ĝin. Jen kelkaj substancoj: terni - teni, kuri - kudri, barilo - brilo, bastono - basa tono, inklino - ink-linio. Ĉion ceteran diros la montraĵoj:

#### Enmetoj:

--- de roman' konturo

--- p - de la daŭr' mezuro

*Solvo: temo - tempo*

"Mi certe devas jam . . . .",

ŝi diris subite,

"al edzo la manĝon . . . .",

aldonis hezite.

*Solvo: kuri - kuir*

Konstruego por ornamo

taŭga estas ĉe kastelo,

sed ne por figuro ŝia

harkupolo estas belo.

*Solvo: alta turo - al statur*

#### Elmetoj

-- n --

komponaĵo por agrablaj voĉaj tonoj

----

besto aŭdiĝanta per miaŭaj sonoj

*Solvo: kanto - kato*

\*Ĉe kelkaj homoj ne . . . . s . . . .  
post la vizito de . . . . .

*Solvo: restos racio - restoracio*

Mon' en bank' sur listo ludas

la signifon gravan,

tial ofte li esploras

ĝian staton pravan.

*Solvo: konto rolas - kontrolas*

Taskoj por diveno:

27. ELMETO:

Estas bedaŭrinda fakto

ke en -- n -- regas --- .

28. ENMETO:

"Mi vin ornamos jen helpe de gemo",  
diris fervore junulo.

Sed tamen amon de ŝi li malhavis.

ŝia favor' iĝis nulo.

*Josef Cink*



## Ni kondolencas

\* La 26-an de junio 2003 forpasis inĝ. **Jiří Vomáčka**, prezidanto de la klubo en Plzeň, en sia 51-a jaro. Li estis mecenato de la klubo, organizanto de la tendaroj en Nekvasovy

\* La 19-an de julio 2003 forpasis la honora membrino de ĈEA **Alena Růžicková-Pavlinová**, iama aktorino de teatro Fratoj Mrštík en Brno. Ŝi naskiĝis la 8-an de julio en 1910 en Holešov, studis dramaturgian konservatorion en Prago (finis en 1934) kaj komencis aktori en la Moravia-silezia Teatro en Ostrava. Poste ŝi revenis al Prago (Studio de Honzl, Akropolis, Urania), transiris al České Budějovice (Sudbohemia Teatro) kaj al Hranice na Moravě (Beskida Teatro). En 1949 ŝi definitive ankris en Brno (Teatro de fratoj Mrštík), kie ŝi kreis multajn rolojn, ekzemple: Vojnarka (Jirásek), Kostelnička (Preissová), Patrino (Čapek), S-ino Dulcka (Zapolska), S-ino Warren (Shaw), Stranga s-ino Savage (Patrick), Avino (Cason - La arboj mortas starante), Panjo (Williams), Ludmila (Tyl), Aurelia (Giradoux), Gizela (Örkeny). Grava estis ŝia pedagogia laboro ĉe JAMU (Janáček-Akademio de Muzaj Artoj).

Kiel membrino de KE Brno ŝi partoprenis koncertojn de operkantistoj per deklamado de poezio aŭ prezentis proprajn vesperojn (Apokrifoj en traduko de Vondroušek). Ŝi propagandis Esperanton antaŭ la publiko menciante ĝin en intervjuoj kaj eĉ de sur la scenejo ĉe sia vivjubilea spektaklo. En 1990 estis al ŝi atribuita la Honora Membrecio de ĈEA.



## Esperanto en Libromondo 2003

Foto de Miloš Vavřín, kiun sendis al la redakcio poetino Věra Ludíková, memorigas la ekspozicion, kiun ŝi aranĝis en aprilo enkadre de Libromondo 2003. Pri tiu ekspozicio de libroj en Prago ni skribis en la pasinta numero de Starto (2/2003, p. 40). Du vitrinoj tie estis dediĉitaj al Esperanto. La vizitantoj povis vidi librojn novajn kaj ne tute novajn, ekz. Verkojn de V. Ludíková, Z. Bergrová, J. Karen, E. Urbanová, vortarojn, Hašek, Panjo de Seifert k.a.

## KALENDARO 2003

- 30.8.-6.9. Ekumena Kongreso Rimini (buse)  
 20.9. Esperanto-tago Pardubice  
 26.-28.9. 16-a IKF Ústí nad Labem  
 17.-19.10. Konferenco de ĈEA en Litomyšl  
 22.-29.10. Lingva seminario Skokovy  
 25.10.-12.11. Ekoturisma flugkaravano al Koreio, Japanio kaj Taivano  
 24.-28.11. Internacia kurso de Esperanto en Dobřichovice  
 28.-30.11. Paroliga kurso en Dobřichovice  
 6.12. La 23-a Ĉeĥa-Saksa TAGO Ústí n.L.

## Jak platit svazu

V kterékoliv pobočce Komerční banky vyplníte pokladní složenku pečlivě ve všech kolonkách, tedy: *měna účtu*: Kč, č. *účtu*: 3330-021/0100, *měna hotovosti*: Kč, částka: slovy, kolik platíte, *jméno a příjmení*, adresa, RČ (nemusí být). Pokud platíte za kroužek (klub, sekci), vyplňte stručně (EK Velim) do kolonky *Vklad jménem* a pošlete tajemníkovi jmenný seznam. Pokud posíláte peníze za sebe, **zopakujte v této kolonce své jméno**. Velmi důležitý je pro určení platby variabilní symbol - číslo (5-místné), které je buď stálé (viz seznam) nebo bude vždy uvedeno na pozvánkách nebo v inf. článku ve Startu. Konstantní symbol je vždy 0379.

Seznam čísel:

- 06940 členství ČES  
 06941 členství UEA  
 06942 předplatné Starta bez členství  
 06943 dary ČES  
 50200 sekce železničářů  
 50400 komise pedagogická  
 50401 písemný kurs začátečníci  
 50402 písemný kurs pokročilí  
 50403 členství ILEI  
 50404 Paroliga kurso  
 50405 svazové zkoušky

- 50500 sekce přátel SAT  
 50600 sekce šachistů EŠLI  
 50800 sekce nevidomých LIBE  
 50900 sekce zdravotníků UMEA  
 51000 sekce křesť. esp. KELI  
 51100 sekce katol. esp. IKUE  
 70100 komise pro tisk a inf.  
 80200 ediční fond  
 80300 propagace v tisku  
 80400 fond Tilio

Pro jistotu napište tajemníkovi svazu, kdy a kolik jste platili - máme řadu neurčených plateb, a to na různé akce, členství ČES, ale i na členství UEA.



## Jak poslat peníze do zahraničí?

Pokud chcete zaplatit knihu, předplatné časopisu, účastnický poplatek apod. do zahraničí, pošlete peníze **mezinárodní složenkou MPI**, kterou si vyžádáte na poště.

## Distanciĝo de ĈEA de la peranto V. Hasala

Ni atentigas membrojn de ĈEA, ke ripetiĝas kaj plioftiĝas plendoj fare de la eldonantoj de E-periodaĵoj al la servoj de la peranto V. Hasala. Ni konsideras nia devo deklari, ke ne temas pri la servo de ĈEA, sed privata aktivado de li kaj ke ĈEA transprenas nian respondecon pri (ne-)plenumo de la antaŭpagitaj servoj. Ĉar ne estas en fortoj de ĈEA peri abonojn, ni rekomendas al niaj membroj pagi rekte al la eldonantoj aŭ per la internacia poŝtmandato (vidu supre) aŭ pere de UEA, se vi havas tie krediton.

*Komitato de ĈEA*



**Periodikum Českého esperantského  
svazu (34. ročník)**

**Redaktor: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,  
malovec.starto@clavis.cz;  
www.clavis.cz/starto**

**Členská evidence a změny adres:  
Pavel Polnický, ČES**

**Uzávěrka dalšího čísla: 31.10.2003**

**Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-  
Asocio (34-a jarkolekto)**  
**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ  
rekte ĉe nia Asocio**  
**Abonprezo: 9 eŭroj  
(se aerpoŝte: + 2 eŭroj)**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,  
Ĉeĥio, e-mail:  
malovec.starto@clavis.cz;**

**www.clavis.cz/starto  
Presis: OPATISK Opava**

**Redaktadfermo de la sekva numero :  
31.10.2003**

**ISSN 1212-009X**

**HRG**  
TISKÁRNA

**každý den něco nového**